


DUONMONATA GAZETO ESPERANTISTA.



LA BELGA SONORILO

JOURNAL ESPERANTISTE BELGE
Bi-Mensuel.

BELGISCH ESPERANTISCH BLAD
verschijnende twee maal per maand.

Oficiala Organo de la « Belga Ligo Esperantista » kaj de la Belgaj Ligaj Grupoj.

Organe officiel de la « Ligue Espérantiste Belge »
et des Groupes Belges affiliés.

Officieel orgaan van den « Belgischen Esperantischen
Bond » en der Belgische aangesloten Groepen.

Vers la langue auxiliaire internationale. (1)

Le passé nous est un sûr garant, malheureusement, de l'avenir. Tant qu'on n'adoptera pas une langue artificielle, simple, logique, et dont l'acquisition peut être très rapide pour toute intelligence moyenne, on demeurera sur terre comme sur la tour de Babel.

Je sais bien de quelle terrible inertie pèse le conservatisme si cher à nos paresseux.

Et que ce n'est pas d'aujourd'hui que d'énormes progrès sont retardés et compromis par le respect fétichiste de ce qui a, ou du moins semble avoir toujours été.

Qu'on me permette un exemple, assez typique, dans le cas qui m'occupe. Chacun sait que l'écriture hiéroglyphique se compose de figures d'hommes, d'animaux, de plantes, d'objets les plus variés, et qu'ainsi le nombre des signes de cette écriture est très élevé.

On s'imagine d'ordinaire, écrit M. Jean Capart, que ces signes sont employés avec une valeur symbolique ou figurative qu'il s'agit de deviner ou d'interpréter.

Il n'en est rien.

Les signes hiéroglyphiques servent à noter, avant tout, des sons, et on peut les lire actuellement avec la plus grande sûreté, sans que l'on ait à craindre des divergences de lecture entre les divers traducteurs.

(1). Extrait de « L'Indépendance Belge », 1^{er} Octobre 1906. Voyez nos n° 54 et 55.

Al la internacia helpanta lingvo (1).

La estinteco estas, bedaŭrinde, certa garantio de la estonteco. Tiel longe kiel oni ne adoptos unu artefaritan lingvon, simplan, logikan, de kiu ellernado povos esti tre rapida por ĉia meza klerulo, ni loĝados sur tero, kiel sur Babelturo.

Mi tre bone konas la teruran inercion, kiun elnaskas de la konservemeco tiel kara al niaj mallaboremaj inklinoj.

Kaj ne estas de nun ke tre gravaj projektoj estas prokrastitaj kaj kompromititaj pro la feticema respekto de tio, kio ekzistas aŭ almenaŭ ŝajnas ekzisti de ĉiam.

Permesu al mi ekzemplon, sufiĉe originalan por la nuna okazo. Ĉiu scias ke la hieroglifa skribado konsistas el figuroj homaj, bestaj, de kreskaĵoj kaj objektoj la plej diversaj, tiamaniere ke la nombro de la signoj de tiu skribado estas tre multa.

Oni ordinare imagas, skribas S^{ro} Jean Capart (Kapar) ke tiuj signoj estas uzitaj kun simbola aŭ figura valoro, kiun oni devas aŭ diveni aŭ sence traduki.

Tio ne estas.

La hieroglifaj signoj utilas nepre por prezento de la sonoj, kaj nun oni povas ilin legi en la plej plena certeco, ne timante iaju discelojn pri lego inter la diversaj tradukantoj.

(1). Traduko el la ĵurnalo « L'Indépendance Belge », 1^a de oktobro 1906, vidu niajn 54^{an} kaj 55^{an} numerojn.

En remplaçant l'aile de papier par des lames d'autres substances, il a observé des effets analogues, mais plus ou moins intenses suivant la substance employée.

Il a constaté aussi que, pour une même substance, la déviation varie suivant les jours : d'où l'idée — confirmée par l'expérience — que les conditions atmosphériques y sont pour quelque chose.

M. Gruhn interprète le phénomène en supposant que l'atmosphère contiendrait deux fluides différents, pénétrant toutes choses, et agissant comme une sorte d'électricité à écoulement lent, pour lesquels il n'y aurait ni isolateurs, ni conducteurs, et dont le mouvement serait accéléré par un échange de chaleur.

Il y a lieu de considérer que les modestes phénomènes qui ont seul révélé, pendant si longtemps, l'existence de l'électricité n'étaient guère plus frappants que les curieux effets dans lesquels M. Gruhn croit voir les manifestations d'une forme nouvelle de l'énergie.

(La Gazette) D'ASTARAC.

NIA TRIOBLA AGEMO.

Mi jus legis ĝojigajn sciigojn pri la grava progresado de Esperanto en Japanujo kaj Brazilujo. En la unua lando potenca asocio starigis, enhavanta pli ol mil du cent propagandistojn; en la alia, dum 5 monatoj, 24 kursoj pri Esperanto kaj 4 asocioj! en ambaŭ landoj revuoj, multe da festoj, paroladoj, k. t. p.

Ankaŭ dum mi skribas ĉi tion, la poŝtisto alportas el Malto poŝtkarton, kiu informas min, ke sur tiu insuleto estas ne malpli ol 500 Esperantistoj!

Tiaj sciigoj devas esti multfoje publikigataj en ĉiu esperanta jurnalo kaj revuo, kaj nepre komunikataj al ne-Esperantistoj.

Pro tiaj bonaj novaĵoj, la Belga Sonorilo ĝoje sonoradas, kaj la belgaj Esperantistoj kuraĝe daŭrigas klopodi por venkigi ĉie la belan, homaman ideon. Ĉiu novulo, ofte, estas fervorega klopodulo. Tial al la navo Esperantistoj ni devas sciigi, kiamaniere ili plej rapide atingos la propagandan celon. Ilia agemo devas disvolviĝi trioble: 1° *person*, 2° *internacie*, 3° *nacie*.

**

Baldaŭ la vintraj kursoj pri Esperanto ree ĉesos kaj la lernantaro disiĝos. La novulo konos la Esperantan gramatikon, il povos fari bonan traduketon.....

Sed li nek interkorespondos, nek interparolos en Esperanto. Nu, lia lernotempo, komencita kun tiom da entuziasmo, ne povas ĉesi malentuziasme. Tute ne! Li devas konatiĝi kun la bela Esperanta literaturo: tutmondaj verkoj, Hamleto, Esperantaj prozaĵoj, Paĝoj el la flandra Literaturo, k. t. p. devos riĉigi lian hejman librokeston aŭ almenaŭ nutri lian sciemon en la biblioteko de la grupo. Li devos perfektigi pri stilo kaj interparolado en specialaj kunsidoj, organizotaj de ĉiu grupestraro.

**

Anstataŭigante la paperan flageton per platetoj de aliaj materioj, li observis samajn efikojn, sed pli aŭ malpli agemaj laŭ la elektita materio.

Li konstatis ankaŭ ke, por difinita materio, la deklino ŝanĝas laŭtage; de tio li konkludas, — konkludo certigita per eksperimentado — ke la atmosferaj kondiĉoj, iom influas.

S^{ro} Gruhn komprenas la fenomenon, supozante ke la atmosfero enhavas du malsamajn fluaĵojn, enigantajn ĉion, kaj agantajn kiel kvazaŭa elekto malrapide fluanta, por kiuj ekzistas nek soligiloj, nek kondukiloj kaj kies movo estus akceligita per interŝanĝo de varmo.

Oni devas konsideri ke la negravaj fenomenoj kiuj solaj, dum longatempo, montris ekziston de elekto, ne estis pli imponantaj ol la kuriozaj efikoj de kiuj S^{ro} Gruhn opinias ke li ricevas elmontrojn de nova stato de energio

Tradukis JOS. JAMIN.

Li ankaŭ ne estos *oficiala* Esperantisto, kaj, en tiu ĉi afero, oficialeco estas nepre utila. Li do devos kiel eble plej baldaŭ sendi sian nomon kun adreso al sinjoro de Menil, 46, Boulevard Magenta, Paris, por enskribo en tutmonda jarlibro esperantista. Tiel li frukte disvolvigos siajn *internaciajn* klopodojn. Dum la jaro, kiu sekvis mian enskribon, mi ricevis centon da leteroj, poŝt - kaj vidkartojn el 14 diversaj landoj de l' mondo. Tiamaniere mi povis korespondadi pri profesiaj rimarkindaĵoj kun multe da samprofesiaj fremdlanduloj.

Esperantistoj! ĉu advokato, ĉu laboristo, ĉu komercisto, ĉu kuracisto, ĉu artisto: en tia korespondado kuŝas por ni ĉiuj la senpera utileco de Esperanto, kiun neniu kontraŭdiranto povas nei.

Ha, kontraŭdirantoj! anstataŭ rediri viajn jam de longe konatajn argumentojn, pripensu la faktojn! Rigardu tiun ĉi sendaĵon el Rusujo, tiun poŝtkarton el Tahiti, tiun sekitan floron el Perujo, tiun leteron el Hispanujo, tiun revuon el Japanujo. Legu la lingvon, saman tra la tuta mondo! — Kaj venu kun mi dum la proksima dimanĉo, kiam mi gvidos tra nia urbo samideanon el Prago.

Jen estas faktoj, neobligantaj ĉiun dubon.

**

Mi devas do valorigi tiujn faktojn, kies graveco facile konvinkas *samlandanojn*. En paroladoj kaj interparoladoj, ni parolu pri faktoj! ni eĉ bruu! « Fen de brut!» kiel ĉiam kriis la bruega Excourbaniés el Tarasko! Kaj flandra proverbo nin avertas: « ne-konato ne-amatigas ».

Sed por brue konatigi Esperanton, ni bezonas junajn fortojn, ni precipe devas varbi studentojn, aŭ almenaŭ organizi varman, studentan movadon por Esperanto, kun bruo kaj kantoj.

Tie ĉi decas reparoli pri specimeno je sekvinda grupeto da Esperantistoj, kiu jam de unu jaro ekzistas en Antverpeno.

*« Tra la fumo de tabako, en trinkej kun bona kelo,
Oni vidas vin bruantajn Esperante pro la celo,
La sankta celo ».*

Ĉirkaŭ sama gasttablo dum la tuta jaro, ili interparolas kaj iafoje eĉ kantas en Esperanto.

La najbaraj klientoj unue mire aŭskultis, iom post iom kutimiĝis je la nova lingvo, poste komprenis kelkajn esprimojn, kiujn ili kuraĝe ripetis inter si; la kelneroĵ aĉetis esperantajn lernolibrojn, kaj nun la trinkejestro jam mendis esperantan revuon kaj eĉ algluigis sur la stratfenestraj vitroj la verdan stelon kun la vorto: Esperanto!

Jam, en antaŭurbo Berchem, unu el tiuj samideanoj fondis alian gasttablon, kaj sekve, Esperantan vivon kun kurso kaj grupo.

Tiamaniere la gasttablanoj, vintre kaj somere,

Chez les instituteurs belges.

Le Journal des Instituteurs, une des revues pédagogiques belges les plus estimées, nous apporte une nouvelle qui montre combien l'idée que nous défendons marche de l'avant.

On sait que les instituteurs de notre pays se réunissent chaque année, au mois de septembre, en un congrès national pour discuter de leurs intérêts professionnels et surtout de questions pédagogiques. Dans ces réunions, il se fait un échange d'idées qui aide puissamment au développement rationnel des méthodes d'enseignement.

L'intérêt de ces assises s'accroît encore du fait de l'existence d'une fédération internationale des instituteurs qui centralise les renseignements fournis par les congrès nationaux.

Rien de ce qui touche l'avenir de l'instruction n'échappe à ces vaillants pionniers.

Dans chaque province belge existe une fédération qui prépare le travail du congrès, c'est-à-dire qui arrête les questions à soumettre à l'assemblée générale.

Cette année, dit le Journal des Instituteurs, la section de la province de Luxembourg fait porter à l'ordre du jour la question suivante:

« Exposer les avantages d'une langue auxiliaire universelle. L'Espéranto réunit-il les caractères que doit revêtir une telle langue? Eventuellement, quel rôle la fédération internationale doit-elle jouer dans la diffusion de l'Espéranto? »

On le voit, le corps enseignement des écoles primaires du Luxembourg ne craint pas d'aborder de front une question que certains professeurs d'université considèrent encore comme irréalisable.

Nous ne doutons nullement que les instituteurs ne voudront accepter avec plaisir tous les documents que la ligue espérantiste belge leur enverra et qu'ils ne défendront vigoureusement cette belle idée de la langue internationale, si digne de leur attention!

LUCIEN BLANJEAN.

faros senĉesan propagandon. Mi ne bezonas vin demandi, ĉu ĝi estos bona.

Mi nur esprimas tie ĉi la koran deziron, saluti la naskon de tiaj gasttabloj en aliaj urboj, kiel hejmoj por vojaĝantaj Esperantistoj! — kaj ankaŭ la proponon ke tiuj grupetoj vizitu unu la aliajn kaj interkonatigu, eĉ organizu dum la somero ekskursiojn por starigi novajn centrojn.

Novuloj, fervoraj klopodantoj jen via tasko! Donu la manon unu al la alia; komencu kun alilandanoj grandegan korespondadon, de la maljunega tero neniam viditan sed, hodiaŭ, obligatan dank' al Esperanto; interparolu kuraĝe kaj montru per faktoj la grandan utilecon de la belega Zamenhof'a elpensajo!

FRANS SWAGERS.

Ĉe la Belga Instruistaro.

Unu el la plej ŝatataj pedagogiaj revuoj de Belgujo, « La Jurnalo de la Instruistaro », alportas al ni novaĵon montrantan kiom antaŭeniradas la ideo pri kiu ni klopodas.

Kiel oni scias, ĉiujare dum la septembra monato, la instruistoj de nia lando kuniĝas en nacia Kongreso por pridiskuti siajn profesiajn interesojn kaj precipe pedagogiajn demandojn. En tiuj kunsidoj okazas interŝanĝo de ideoj tre multe helpanta la racian malvolvon de l' metodoj en la instruado.

L'utileco de tiuj kunvenoj ankoraŭ pligravigas pro la ekzisto de federacio internacia kiu kunekolektas la informojn liveritajn de l' naciaj kongresoj.

El kio rilatas la estontecon de l' instruado, nenio forpasas nevidita de tiuj pioniroj.

En ĉiu Belga provinco ekzistas federacio preparanta la laboron de l' kongreso, t. e. d. ke ĝi difinas la demandojn pritraktotajn de l' ĝenerala kunveno.

Ĉi tiujare, raportas la Jurnalo de la Instruistaro, la sekcio de l' provinco Luksemburgo enskribigis en la tagordo la sekvantan temon:

« Montru la utilecon de helpa tutmonda lingvo. Ĉu Esperanto enhavas la postulitajn kvalitojn de tiela lingvo? Eventuale, kian rolon devas ludi la internacia federacio pri la disvastigado de Esperanto? »

Oni vidas ke la instruistaro de l' unuagrada lernejoj en la provinco Luksemburgo ne timas pridiskuti fronte temon kies efektiviĝo ŝajnas ankoraŭ nebla al iaj profesoroj de Universitato.

Ni neniel dubas ke la instruistoj plezure akceptos ĉiujn dokumentojn sendotajn de l' Belga Ligo Esperantista kaj certa ni estas ke ili varme defendos tiun belan ideon pri lingvo internacia; ĝi vere estas inda je ilia atento!

LUCIEN BLANJEAN.

Ten slotte werd de gevierde leeraar door den onvermoeibaren voorzitter der groep, den heer Dr R. Van Melckebeke warm geluk gewenscht, waarop deze, in een geestdriftige improvisatie van harte zijne leerlingen dankte, en hen aanzette om aan de esperantische zaak getrouw te blijven.

Vergeten wij niet hier te melden dat prachtige bloemgarven geschonken werden aan Mevr. Van der Biest, de echtgenoot van den professor en zelve ijverige esperantiste, eveneens aan Mevr. Jacobs en Juffrouw Giffroid, die bijzonder tot het welgelukken der betooging hadden bijgedragen.

Berchem. — Na het sluiten van den welgelukten leergang door den heer Dr W. Broeckaert gegeven, richtte men aldaar in het *Café des Arts* op 30^{en} Januari eene groep in onder den naam van « Berhem'a Grupo Esperantista ». Hierover, alsmede over de feestzitting ter eere van den sympathieken leeraar, ontvingen wij een artikel, dat te laat werd ingezonden om het in zijn geheel te kunnen opnemen. Wij zullen hierop in ons a. s. nummer terugkomen.

Belga Ligo Esperantista.

Kiel ni jam raportis, la Ligo organizas petskribon kaj rikoltas ĉiujn dokumentojn taŭgajn.

Ĝi disdonas senpage al ĉiuj esperantistoj foliojn preparitajn en difinita formato ĉar ĝi intencas bindikigi tiujn foliojn por prezenti la petskribon al la estraro.

Sin turni al la sekretario de la Belga Ligo Esperantista, 53, rue Ten Bosch, Bruxelles.

ESPERANTISTAJ KONSULOJ.

Ni memoras al nia gelegantaro ke la 2^a Kongreso aprobis la fondon de konsulejoj sed kondiĉe ke tiu fondo estos tute loka afero; kiam ia Societo aŭ Grupo rekomendas ian konsulon, ni tion montros. Ĉiu Esperantisto povas, propravole, sin difini konsulo, sed ni povas prezenti por li, nenian garantiaĵon.

DUA NOMARO.

(vidu nian 51^{an} numeron).

FRANCUJO.

St Nazaire sur Loire: R. V. R. Aubin 97, rue du Croisic.
Tours: Konsulejo de la Grupo Esperantista: Maurice Patin, 5, rue Michelet.

La Rochelle: Sam. Meyer, Makleristo.
Reims: Konsulejo de la Grupo Esperantista, E. Chauvillon, 5, place Royale.

Beziers: S^{ro} A. Carles, rue des Balances.

Fine, la nelacebla prezidanto de l' grupo, Sinjoro Doktoro Van Melckebeke, varme gratulis la festitan profesoron, post kio tiu ĉi, en entuziasma improvizo tutkore dankis siajn gelnantojn, kaj invitis ilin por resti fidelaj al la esperantista afero.

Ni ne forgesu ĉi tie ke belaj floraj garboj estis prezentitaj al Sinjorino Van der Biest, la edzino de la profesoro kaj fervora esperantistino mem, kune kun al Sinjorino Jacobs kaj Fraŭlino Giffroid, kiuj precipe kunhelpis al la sukceso de la elmontro.

Berĥemo. — Post la fermo de la bone sukcesinta kurso, donita de S^{ro} D^{ro} W. Broeckaert, oni starigis je la lasta 30^a Januaro grupon en la tiea *Café des Arts*, sub la nomo « Berhem'a Grupo Esperantista ». Pri tio, ankaŭ pris la festa kunveno kiu okazis je l' honoro de la simpatia profesoro, ni ricevis artikolon, kiu alvenis tro malfrue por ke ni ĝin enpresigu tute. Ni reparolos pri la dirita artikolo en nia proksima numero.

Avizo al la Antverpenaj esperantistoj.

La kunsidoj de la Antverpeno grupo rekomencos je la 23^a de Februaro kaj okazos ree ĉiusabate en la grupo kunveno « Taverne Royale », sed laŭ nova programo:

Je la 8 1/2^a h. ĝis la 9^a; ĝenerala ripetado de la kurso de S^{ro} Van der Biest;

Je la 9^a h.: ekzercoj por interparolado, prezento de verkoj de la grupanoj, deklamoj k. t. p.

Je la 23^a Februaro D^{ro} Raym. Van Melckebeke rakontos sian *Vojaĝon tra Szisujo*. La parolado estos ilustrata per lunaj bildoj.

ANGLUJO.

Leeds: Konsulejo de « The Leeds Esperanto Society ».
J. A. Woodhead, Newport House.
F. L. G. Maréchal, 12, Eldon Place.
J. H. Beaumont, 19, Leathley Road, Hunslet.
R. Stancliffe, Central homme, street lane, Roundhay.

Plymouth: J. A. Thill, 6 Barton Crescent.

RUSUJO.

Elisavetpol (Transkaŭkazo): M. Krjuĉkov, « Esperanto-Ofico ».

BRAZILUJO.

Rio de Janeiro Konsuloj de la Brazila klubo « Esperanto »
Everardo Backheuser, Escola Politeknika, largo de S. Francisco. Raymundo Kautão, rua dos Ourives 107 (1^a etaĝo).

TRA LA MONDO ESPERANTISTA.

TRILINIAJ NOVAĴOJ.

La Aŭstra ilustrata gazeto « Neugkeits-Welt-Blatt » enhavas, ĉiusemajne, mallongan artikolon skribitan en Esperanto, tio estas taŭga kaj lerta propagando.

Societo « Espero » Bol. Podjaĉeskaja, 24, Peterburgo, intencas fondi Tutmondan Studentan Grupon, kaj vokas aprobon de ĉiuj Esperantistaj studentoj.

Dum majo, okazos en urbo Dresden, Esperantista ekspozicio kaj la tiea grupo akceptos plezure ĉiujn eldonadojn, komercajn kaj propagandajn ilojn. D^{ro} Schramm, Dresden-Landhaus.

Ni ricevis cirkuleron, kiu proponas fondon de Gazeto Matematika Internacia; de nun oni povas sendi la aprobon al S^{ro} F. J. Vaes, Mathenesserlaan 290, Rotterdam.

La Sveda Esperantista Societo fondiĝis en Stockholm de la 1^a de Decembro sub la prezido Waldemar Langlet, sekretario P. Ahlberg, vicprezidanto Doktoro S. E. Krikortz.

La adreso de la Provizora Organiza Komisiono de la tria Kongreso estas « Kongreso, 2 King's Parade, Cambridge, England. »

La Societo Argentina Esperantista estas fondita en Buenos-Aires. La sekretario kasisto estas S^{ro} Herbert Farnes, al kiu oni povas sin turni.

La garantia kapitalo oferita de niaj anglaj samideanoj por la Tria Kongreso, ĝis la 14^a de Januaro, atingis sumon da 1200 sterlingaj funtoj t. e. d. 30.000 frankoj.

RECETTES CULINAIRES.

Homard bouilli.

Faire cuire un homard. Détacher de la coquille les œufs ainsi que les grosses pattes du corps. Fendre le corps sur sa longueur. Vider les deux moitiés du coffre au moyen d'une petite cuillère et mettre de côté la substance retirée. Couper la queue et en retirer les chairs. Découper les chairs en tranches et les remettre dans les coquilles préalablement garnies de persil, en ayant soin que le côté rouge se trouve en dessus. Couper les coquilles des pattes afin d'en mettre les chairs à découvert. Les dresser sur un des bouts, appuyées sur un bouquet de persil, garnir aussi avec du persil les coquilles du coffre. Envoyer en même temps la sauce ci-dessous dont nous empruntons la formule au livre de cuisine de M. Urbain Dubois.

Sauce. — Mettre dans un mortier la valeur de quatre cuillerées à bouche d'œufs de homard, ainsi que la substance retirée des coffres et six jaunes d'œufs crus; piler le tout et déposer dans une terrine. Délayer cette pâte avec deux décilitres d'huile, un peu de vinaigre et deux cuillerées de moutarde; assaisonner avec sel et poivre de Cayenne; ajouter une pincée d'échalotte crue, de persil et d'estragon hachés. Et verser dans une saucière froide.

Esperantistaj Socialistoj proponos uzon de Esperanto en la proksima Socialista Kongreso en Stuttgart kaj ankaŭ organizon de Esp. vesperfestoj.

La ĵurnalo « Idei International » sciigas al ni ke la lernolibro en franca lingvo estas de nun prokrastita pro perdo de la manuskripto!

« Germana Esperantisto » enhavas tre bonan artikolon sub titolo: La Angla lingvo kiel lingvo internacia, verkita de Prof. Laval, Haubinda.

En Brünn, S^{ro} Pawelka fervore propagandas Esperanton inter la blinduloj de la tiea blindulejo. La grupo el Brünn aranĝis belan krisnaskan feston.

La « London County Council » kiu estas la estraro pri edukado en urbo Londono, instruigas Esperanton en kvar el siaj lernejoj.

En la venonta kongreso de kontraŭ-alkoholismo en Stockholm 1907, la « bontemplanoj » uzos permeso Esperanton.

S^{ro} L. W. Schmidt, fondinto-prezidanto de la grupo de Wiesbaden kaj komitatano de la Germana Esperantista Societo, mortis subite pro apopleksio.

La Internacia Scienca Oficejo estas definitive organizita sub direkto de S^{ro} René de Saussure. Sciicojn pri kreo de tiu oficejo oni povas ricevi; sin turni 8, rue Bovy-Lysberg, Genève.

S^{ro} John Lundgren, nia sveda samideano, entreprenis vojaĝon per Esperanto, kaj vizitis Belglandon, kie li renkontis multajn korespondantojn siajn.
MOZANO.

KUIREJAJ ORDONOJ.

Boligita Omaro

Kuiru omaron. Eltiru de la karapaco (kiraso) la ovojn kaj la dikajn prenilojn de l' korpo. Fendu la korpon duone laŭ longo. Elprenu la internajon de la du ricevitaj partoj per kulereto kaj metu aparte la eltiritan substancon. Tranĉu la voston kaj alprenu la karnon. Distranĉu tiun karnon kaj reenlokiĝu ĝin en la karapacaj konkoj antaŭe provizitaj per petroselo, zorgu ke la ruĝa flanko montriĝu supre. Rompu la prenilojn por nudigi la karnon. Sur unu el la pintoj, starigu ilin apogitajn al « bukedo » da petroselo, provizu ankaŭ la ambaŭ konkpartojn per petroselo.

Prezentu samtempe la sube montritan saŭcon, de kiu la preparan formulon ni prunte prenas el la kuireja libro de S^{ro} Urbain Dubois.

Saŭco. — Metu en pistujo kvar plenkulerojn da omar-ovoj, la substancon eltiritan el la karapaco kaj ses flavcentrojn da krudaj ovojn; pistu ĉion kaj metu en terpoto. Dissolve tiun paston en du decilitroj da oleo, kelke da vinagro kaj du plenkuleretoj da mustardo; spicu per saŭo kaj Kajen' pipro; aldonu preneton da kruda ŝaloto (ajla bulbo), da petroselo kaj stragono (aromata herbo). Verŝu en malvarmigita saŭcujo.

VATELINO.

Lasta Juĝo.

HUMORA RAKONTETO.

1. — Estis nokto: hela kaj varmeta nokto de somero. Kvin junuloj, el vilaĝo festo, reiris al la urbo.

Ili estis tre gajaj: laŭte ridis kaj kantis, krom unu, kiu estis tiom ebria, ke li ne povis marŝi. Liaj kunkuloj, tenante lin sub liaj brakoj, malfacile trenis lin; kaj la malfeliĉulo nekonsciante kion li faras, puŝante la ŝtonojn de la vojo, kiu faldanta korpo, ŝancelanta kapo, vidigis la plorigan spektaklon de plena ebrieco.

— Sed, diris unu el la junuloj, ni estas ankoraŭ malproksime de l' urbo, kaj, laŭ nia malrapideco, mi vidas ke ni ne baldaŭ alvenos. Estas la dekonua, kaj morgaŭ, fru-matene mi devos eliri por labori. Mi dezirus tamen ripozi dum kelkaj horoj.

— Kion fari? diris alia; ni ne povas tie ĉi lasi tiun sensentan drinkulon: en lia nuna stato, malfeliĉaĵo povus lin atingi, kaj ni rajte bedaŭrus pri tio.

— Sed, diris la unua, se ni kuŝigus lin en la fosajo, flanke de la vojo?

— Aŭdu vi, diris tria, mi elpensis ion: la tombejo estas nur je kelkaj pasoj de tie ĉi: ĉiam estas kavoj antaŭe fositaj: si ni lin metus en iu el ili? Tiel, nenia malfeliĉaĵo estus okazonta: la aero estas belega, varma la vetero: nia enuiga drinkulo tie dormegos kiel en sia lito kaj, morgaŭ, li povos reiri tute sava.

— Hurah! Bonega estas via ideo, ekkriis la petoluloj ridante: tio estas bela ŝercajo per kiu li pagos la emuojn, kiujn li donis al ni!... Antaŭen!..

Kaj kvarope kaptinte la drinkulon je la kvar membroj, ili elportis lin, nelaŭte kantante funebran kanton.

2. — Jam alte en la ĉielo ja staris la suno, kiam nia drinkulo malfermis siajn okulojn.

Ankoraŭ tute plipezigata de la alkoholaj vaporoj, li devis kelkatempe pensi por certigi pri la loko kie li estas. Kiam fine li konstatis ke li kuŝas funde en fosajo, li provis memori kiel tio okazis: sed el lia obstrukteigita cerbo, nenia ideo spruciĝis. Subite grandega teruro kaptis lin:

— Bona Jesuo, li diris al si mem, mi kuŝas en tombo... mi enteriĝis... mi estas do mortinta!... Mi, malvivulo?... Tamen... tamen...

Tion dirante, li premis siajn membrojn... per fingroj palpetis la flankojn de la kavoj... fermis kaj malfermis la okulojn...

— Tamen... ŝajnas al mi ke mi estas viva! Tiam luma penso eniris lian drinkulan cerbon: Jes, li diris, mi estis mortinta... sed mi reviviĝas... hodiaŭ estos la lasta juĝo!

Precize ĉe la sama momento, kiam li tiel parolis, kavaleria regimento laŭiris la tombejon, kaj subite la trumpetoj bruege sonis en la matena silento.

— Nenia eraro, ekkriis la drinkulo: jen la anĝeloj sonigis siajn trumpetojn!... Ho, bona Dio, kia afero!... Sed... mi devas iri al la juĝo... Nur... mi ne scias kie estas la juĝejo... Ba!... mi unue eliru el la tombo: mi sekvos la afiajn.

Levinte sin mallerte, li sukcesis, post multe da klopodoj, supreniri el la fosajo. Li rigardis ĉirkaŭ si kaj miriĝis vidante ke, en la tombejo, ĉio tute silentas.

— Ho! diris li; ŝajnas ke mi estas la unua! Same li memoris ke, kiam li estis vivulo, drinkejo staris antaŭ la tombejo.

— Nu! ekkris li, tuj rigardu ni ĉu la drinkejo estas ankoraŭ tie: ni eltrinkos glaseton, atendante la aliajn kunreviviĝantojn!

Kaj la drinkulo forlasis la loĝejon de la mortuloj, por reniri la societon de la vivuloj.

E. V. HONICKS.

PROBLEMOJ.

PROBLEMO 28^a (de S-ro Weemaes). — Kiel homo fariĝos monero, — presajo, rivero, — besto, piedvesto, — homparto, ludkarto?

PROBLEMO 29^a (de Plantano). — Anstataŭigu la punktojn per konvenaj vokaloj: vi legos frazon el krestomatio:

L. .nk.nd.k. d. luyv. ant.n.e. .p.rts .l l.h.m.r. grand.gn .l.l.n.

PROBLEMO 30^a (de Plantano)

a . o . i
a . i . n
g . j . i
i . t . r
e . e . o
b . l . i
o . k . o
l . k . j

Anstataŭiginte la punktojn per konvenaj literoj por formi vortojn, oni legos du vortojn signifantajn: pseŭdonimo konata de miaj divenantoj; militestro.

PROBLEMO 31^a (de Plantano). — Vortoj kvadrato metitaj kun unuformaj oblikvaj literoj.

Ion forlasi el pagota monsumo (radiko). — Ekleziulo — frap-
on — organa malfortiĝo — Mallongiĝo de Antonio.

Figuro:	1	2	3	4	5
	2	3	4	5	6
	3	4	5	6	7
	4	5	6	7	8
	5	6	7	8	9

PROBLEMO 32^a. — Unu estas farita per la alia; ambaŭ estas valorhavaj kaj diferencas nur per unu litero.

Oni sendu la solvojn al S-ro J. Coox, en Duffel, antaŭ la 30^a de Marto.

Oni bonvolu uzi nur poŝtkartojn por sendi la solvojn, kaj ĉiun karton nur por unu serio da problemoj.

Niaj divenantoj rajtas uzi pseŭdonimon publikigotan en la gazeto, sed ni bezonas nepre koni la veran nomon.

Sekve, tiu, kiu subskribis *Cn. d. M.*, bonvolu konigi sin. Tio estas nepre necesa por klasigo kaj dispartigo de l' premioj.

SOLVOJ.

PROBLEMO 15^a. — Nenio estas super Esperanto.

» **16^a**. —
K
J A M
J U N I O
K A N T O R O
M I O P A
O R A
O

» **17^a**. — Tra ge di o
ge ni o
di o
o

» **18^a**. — I d o
d u m
o m b r o
r i p
o p i n i
n u r
i r i.

PROBLEMO 19^a. — Se vi diros ke « li » flugas, la birdo estas vireksa, — se vi diros ke « ŝi » flugas, estas ino!

PROBLEMO 20^a. — Plando, lando.

PROBLEMO 21. — A). Inter diversaj manieroj numerigi l' alfabeton laŭ postulo de l' demando, jen tiu kiu estas alpren-
ebla:

a	b	c	ĉ	d	e	f	g	ĝ	h	ĥ	i	j	ĵ
2	4	6	8	10	12	14	16	18	20	22	24	26	28
k	l	m	n	o	p	r	s	ŝ	t	u	ŭ	v	z
27	25	23	21	19	17	15	13	11	9	7	5	3	1

B). Laŭ la demando de l' problemo,

$$x = \frac{1+2+3+4+5+6+7+8+9+10}{2} = 3,5 = 24$$

El tio, farante la kalkulojn, ni trovas laŭ vice:

III=12, VII=2, VI=15, V kaj IX=9, VIII kaj I=19; IV=25, II=13.

Sekve, la intermiksita vorto estas:

Romcifere: I II III IV V VI VII VIII IX X

Arabeifere: 19 13 12 25 9 15 2 19 9 24

Litere: o s e l t r a o t i

El tio; ARISTOTELO.

DIVENIS. — S^o Plantano, ĉiujn; S^o Chaufoureaux, ĉiujn krom 19; S^o Mathys, ĉiujn krom 19, 21; S^o Weemaes, 15, 16, 18, 20; S^o Lundgren, 15, 16, 18, 21; S^o Cn. d. M., 16, 17, 18.